# *La etaj insulaj ?tatoj devas kune labori por evoluo*

*Image not found or type unknown*




**Foto: Studio Revolución**

Sankta John, Antigvo kaj Barbudo (RHK) La membro de la Politika Buroo kaj vicprezidento de la Respubliko de Kubo, Salvador Valdés Mesa, alvenis al ?i tiu urbo, ?e la kapo de la delegacio el Grandaj Antiloj, kiu partoprenos, inter la 27-a kaj la 30-an de majo, en  la IV-a Konferenco de Malgrandaj Insulaj Evoluantaj ?tatoj (SIDS).

Krome, li faros oficialan viziton al tiu lando, kadre de la 30-a datreveno de la starigo de diplomatiaj rilatoj; renkonti?os kun la ?efministro, Gaston Browne; akceptos kavaliron Rodnehy Williams, ?enerala guberniestro de la insulo; kaj dialogos kun kubaj kunlaborantoj kaj solidarecaj amikoj.

Sub la devizo: Plani  la vojon al rezistema prospero, la Konferenco diskutos pri la nuna multdimensia krizo, kiu ne nur limigas la rajton je disvolvi?o de malgrandaj insulaj ?tatoj, sed anka? endan?erigas ilian ekziston.

SIDS alfrontas la kombinitan sociekonomikan efikon de Covid-19, malaltajn kreskorapidecojn, altajn nivelojn de ?uldo, inflacion, nutrajn kaj energikrizojn, malkreskantan Oficialan Disvolvan Asistadon, kaj la pligravajn efikojn de klimata ?an?o kaj naturaj katastrofoj.

Por Kubo, la ?efa defio por la efektivigo de la Samoa Vojo, unu el la dokumentoj, kiuj regas la grupon de SIDS, estas la da?ra aplikado kaj intensigo de la usona ekonomia blokado  kontra? la Insulo, kaj la arbitra inkludo en la liston de ?tatoj supozeble sponsorantaj terorismon.

La Grandaj Antiloj, kiu malgra? siaj limigoj aktive kunlaboris kun la resto de la SIDS, konsideras nepra entrepreni agojn kiuj permesas pli grandan aliron al financado en favoraj kondi?oj kaj teknika kunlaboro.

La grupo de Malgrandaj Insulaj Evoluantaj ?tatoj konsistas el 38 UN-Membro-?tatoj kaj 20 ne-UN-Membro-?tatoj/Asociaj Membroj de Regionaj Komisionoj.

Fonto: Granma

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/355739-la-etaj-insulaj-statoj-devas-kune-labori-por-evoluo

Radio Habana Cuba